[noto] fonto: "Budhana Kuriero", n-ro 27-29, 1966 (B.E. 2510)

verkinto ne estas indikita; eble la redaktoro Marcel Bury?

# *Kiel mi alvenis al budhismo?*

Kiam mi legis la deziron esprimitan de legantino de b.k., mi ŝatis multe tiun sugeston kaj mi decidis skribi tiun ĉi artikolon. Decidi pri tio estis facila afero, sed plenumi la decidon estas malpli facile realigeble. Ĉar hodiaŭ, mi estas sidanta antaŭ mia skribtablo, ĉio estas preta por skribi mian rakonton, la paperfolioj estas sur la tablo, mia skribmaŝino kaj miaj memoraĵoj atendas mian bonvolon, sed mi hezitas. Ĉion diri ne plu estus iu artikolo. Libron mi ne povas skribi pro diversaj kialoj. Tial mi hezitas !

Ankaŭ pro la nesufiĉeco de nia homa lingvo mi hezitas, ĉar eĉ ĉe posedo de riĉenhava vortaro niaj vortoj estas malkapablaj esprimi ĝuste tion, kion oni volas komuniki al aliaj homoj. Aliflanke mi estas tre ĝenata. Neniam mi ŝatis paroli pri mi aŭ pri miaj faroj. Ankaŭ hodiaŭ kaj malgraŭ la anonimeco, kiu kovros kaj kaŝos min, mi estas tre ĝenata. Kelkaj eble komprenos mian embarason, aliaj supozos ke tiu ĝenateco devenas de malindaj faroj miaj. Certe mi ne estas sanktulo, sed mi ne estas diablo. Mi estas nek anĝelo nek besto. Supozeble mi estas iu, kiu provas atingi la homan staton. Finfine, por skribi tiun ĉi rakonton mi devas pensi ke ĝi estu iel utila al iu.

Skribante pri iaj eventoj, mi mencias ilin tute ne por trumpeti miajn supozitajn meritojn, sed nur por montri al vi -- gelegantoj -- ke kelkaj serĉas tion, kion ili jam havas en si. En la sino de la homaro estas homoj, kiuj portas(is) alian etiketon ol la budhisman, tamen kelkfoje ili kondutas(is) kiel konvinkitaj budhanoj. La sekreta evolucio, kiu okazas en homaj konscioj, mokas la ismojn, kiuj kreas imagajn limojn.

Post tiuj ĉi enkondukaj vortoj mi komencas mian rakonton.

Miaj gepatroj kaj geavoj estis katolikoj, ĉar oni diris ke "decaj homoj" nur estas tiuj, kiuj kultobservas la katolikan religion. Kaj pro la timo antaŭ la onidiroj kaj de la malbona reputacio mia patrino kondukis min ĉe la dimanĉa diservo katolika. Kiam mi atingis la aĝon por fari la unuan geston de kristano -- proksimume je la 12a jaraĝo -- miaj gepatroj diris al mi mian devon partopreni la katekism-kurson. La unua formalaĵo, kiun oni devis plenumi, estis la konfes-preno. Dum tiu formalaĵo la paroĥestro metis antaŭ min kelkajn demandojn, kiuj estis tre strangaj kaj kiuj grave ŝokis min. Kiam mia patro vespere rehejmiĝis post sia ĉiutaga laboro, li demandis min pri la eventoj de mia lernejtago. Sen precizigi tion, kio ŝokis min inter la demandoj de la pastro, mi energie diris al li mian volon ne plu renkonti tiun pastron. Malgraŭ la protestoj patrinaj mia patro kaj mi decidis, ke mi ne partoprenu la katekism-kurson.

La milito 1914-1918a alvenis kaj en la militkomenco tiu pastro malbone kondutis al kelkaj francaj soldatoj, kiuj estis vundataj kaj kaŝiĝantaj en arbokulturejo. Tio naŭzis

multajn samlandanojn miajn kaj ankaŭ miaj gepatroj ne plu volis aŭdi ion pri la katolika eklezio.

Eble mi devus tie ĉi malfermi parentezon por klarigi la sangajn cirkonstancojn en kiuj la katolikismo imponiĝis en nia lando, sed tio estus tro longa kaj ankaŭ ne utilus por la celo de tiu ĉi rakonto.

Pasis la jaroj kaj mi atingis la 15an aŭ 16an jaraĝon. Laŭ reli gia aŭ filozofa vidpunkto mi estis tuta malklerulo.

Iam mi ĉeestis en publika demonstracio de magnetismo, kiun gvidis virino. La demonstracio okazis kune kun du kunlaborantoj kaj la prezentataj faktoj estis certe strangaj. Mi eliris el la spektaklejo en mi havante la konvinkon ke mi povas esplori tiun misteran aferon, trovi la kialon de tiuj fenomenoj kaj ke ankaŭ mi kapablos reprodukti ilin. Tiu ĉi hazarda renkontiĝo estis la decida okazo, kiu direktis min al nova vivo, t.e. al vivo en kiu la kaŝa flanko de la aĵoj estas plej grava ol la ĉiame videbla. Mi Jus uzis la vorton "hazarda". Verdire mi estas nun konvinkita ke hazardo ne ekzistas. La uzo de tiu vorto kaŝas la nescion pri la meĥanismo de la kialoj kaj sekvoj. Post kelkaj jaroj, se oni pripensas iajn vivokazojn, oni malkovras la ligilon, kiu ligas ilin unu kun la aliaj.

Nelonge post mia ĉeesto en la magnetisma kunveno mi vidis broŝuron en la montrofenestro de ĵurnalvendejo. La broŝuro pro ĝia stranga titolo altiris al si mian atenton kaj mi aĉetis ĝin. "Naskiĝi, morti, renaskiĝi, tiel estas la leĝo !", tiu titolo kaj la enhavo de la broŝuro nenion alportis al mi. Sed la lasta kovrilpaĝo donis al mi la nomojn kaj adreson de la eldonisto kaj ankaŭ kelkajn librotitolojn, kiuj pritraktis la psikajn povojn de la homo.

Mi tuj aĉetis la plej gravan libron, kiu estis bonega magnetism-kurso verkita kaj eldonita de d-ro H. Durville (Parizo).

La demando, kiu metiĝis antaŭ min, estis la sekvanta: "Ĉu certe ekzistas magnetismo en la homo?". Post serioza studado de la libro kaj post kelkaj monatoj, dum kiuj mi faris la rekomenditajn ekzercojn, mi kapablis plenumi la plej simplajn provojn. La unua provo malsukcesis pro la mokemo de mia kunlaboranto elektata. Tiam mi turnis min al la plantoj, kiuj donis al mi la certan pruvon de la magnetism-ekzisto. Poste mi elektis bestojn kiel pasivajn kunlaborantojn. Sekve mi reiris al la homoj.

La patro de d-ro H. Durville ankaŭ estis psikisto kaj verdire liaj psikaj serĉadoj estis atigintaj pli interesajn kaj profundajn rezultojn ol tiujn de lia filo. Ekzemple, li sentime kaj lerte dupartigis siajn kunlaborantojn. Ni komprenu bone la signifon de la vorto "dupartigi", kiam ĝi estas uzata en la psika kampo. Dupartigi sian kunlaboranton -- kiun oni nomas ankaŭ "subjekton" -- signifas, ke tiu subjekto sidas sur seĝo, dum kiam la psikisto lin saturas per magnetismo. Tiu ĉi magnetism-saturo okazigas la apartiĝon de la fizika kaj de la psika hompartoj kaj la psikan parton oni povas forsendi proksimen aŭ malproksimen de la fizika korpo de la subjekto.

Studante la serĉadojn de tiuj psikistoj, ripetante kelkajn el iliaj esploraĵoj por kontroli mem ilian realecon, mi akiris la pruvon nediskuteblan ke la homo estas komponaĵo el

fizika kaj alia materio. Ankaŭ tiuj psikaj esploroj montris, ke, kiam la subjekto estas "dupartigata", liaj kapabloj (sensoj, sento-kapablo, memorkapablo, k.a.) ne plu ĉeestas en la fizika korpo. Ili estas transloĝiĝantaj en la alian korpon, al kiu la psikistoj donas diversajn nomojn: etera korpo, astrala korpo, psika korpo, k.a.

Oni scias la ekziston de pluraj kategorioj de homoj inter la serĉantoj. Kelkaj estas tre, tro prudentaj kaj ĉe la alia ekstremo,kelkaj estas tre aŭdacaj kaj eĉ riskemaj. Ankaŭ ĉe la psikistoj oni trovas tiujn riskemulojn. Tion ni ne devas bedaŭri, ĉar dank' al ilia kuraĝego oni povas(is) malkovri kelkajn novajn verojn rilate la homan komponiĝon.

*****

Mi supozas ke la legantoj -- kiuj estas neinformitaj pri la psikaj kaj metapsikaj esploroj --, kiam ili legis la lastajn liniojn de mia rakonto estis pli aŭ malpli skeptikaj. Tion mi tre bone komprenas kaj tian sintenadon mi tute aprobas, ĉar ankaŭ mi estis skeptikulo antaŭ miaj propraj spertoj kaj eksperimentoj. Pro tio mi sentas min devigata al mia rakonto aldoni kelkajn mallongajn klarigojn, ĉar unue ni devas esti konvinkataj, ke nia paŝado okazas nur sur iu firma, certa grundo.

En la ĉi-supre menciitaj linioj mi diris ke pro la "dupartigo" de la "subjekto" liaj kapabloj (sensoj, sento-kapablo, memorkapablo, k. a.) ne plu ĉeestas en la fizika korpo. "Ili estas transloĝiĝantaj", mi diris, "en la alian korpon...". Mi facile divenas la demandojn kiuj turmentas la kapon de la skeptikaj legantoj kaj mi provas repondi koncize, ĉar mi ne rajtas tro longigi tiun ĉi rakonton.

La "alia korpo de la subjekto" estas alsendata ordone de la eksperimentanto al seĝo, kiu staras apud la seĝo de la subjekto dormanta. Kaj tie ĝi (la astrala korpo) sidas, kiel la fizika korpo estas sidanta sur la unua seĝo. Plurajn eksperimentojn oni povas provi kontraŭ tiu astrala korpo, kiu kompreneble estas komponata de nevidebla materio. Tiu astrala korpo estas konstante ligata kaj komunikiĝanta kune kun la fizika korpo per iu fluida kordono, kiu iel similas la umbilikan ŝnuron kunligantan la patrinon kun la embrio. Per tiu fluida kordono la fizika korpo daŭre partoprenas la spertojn de la astrala korpo kaj montras la samajn reagojn, kiujn ĝi montrus, se la eksperimentoj estus farataj en tempo kiam ĝi ne dormas. La sentoj -- agrablaj kaj malagrablaj -- estas momente sentataj de ambaŭ korpoj de la subjekto. Jam en la unua fazo de la eksperimento t.e. kiam la subjekto estas en la profunda dormo, kiu antaŭas la dupartigon oni povas konstati ke la sentokapablo ekz. ne plu estas en la haŭto sed ĝi estas lokata en la spaco, kiu ĉirkaŭas la korpon. Ĉi-momente la subjekto jam reagas kiam ekz. la prezentata kudrilo atingas lokon (spac-punkton), situanta 5 ĝis 10 aŭ 15 aŭ 20 cm. for de la haŭto. Tiam la haŭto mem estas tute sensenta. La eksperimentanto difinas tiun ĉi dormfazon per la vortoj "eksterigo (aŭ eligo) de la sentemo".

Ekde la sendorma stato ĝis la "eligo de la sentemo" la subjekto trairas plurajn diversajn dormfazojn kaj ĉiu el ili prezentas malsamajn fenomenojn. Inter ili tiu, kiu

estas tre interesa por la eksperimentanto, estas la fazo, kiu permesas ke la subjekto vidas iajn aĵojn kiujn la kutima vido homa ne perceptas. Tiu ĉi escepta vido estas tre utila por sekvi kaj kontroli la psikan esploron. Kompreneble, ĉi-kaze du esplorantoj kaj du subjektoj devas kune labori. Ankaŭ kelkajn preparojn oni devas plenumi por eviti "interferojn" (trompan interkomunikadon) inter ambaŭ subjektoj.

Se tiaj kondiĉoj ekzistas, oni povas fari bonegan esploradon kaj la kontrolo estas kontentiga. Se spite al tiu kontrolo oni ne fidas al la informoj, kiujn donas la kontrolanta subjekto, oni povas uzi la fotografilon ŝargata per ultra-impresebla plako. Oni povas sukcese havigi al si kontentigajn fotojn de la "fantomo de la vivanto", kiel ankaŭ oni nomas la astralan korpon de la homo.

Tiuj eksperimentoj pruvas do, ke en la fizika kaj videbla korpo de la home estas ankaŭ alia korpo, kiu kutime estas nevidebla. Kelkaj kuraĝegaj psikistoj puŝis tre longe kaj tre intense la eksperimentojn. Ili tiel dupartigis la astralan korpon kaj izolis la "mensan" aŭ "spiritan korpon". Por la legantoj de "budhana kuriero" kiuj estas sciemaj, mi resume aldonas, ke la staturo de la "astrala korpo" estas iom malpli granda ol tiu de la fizika korpo kaj ĝia koloro estas diversa laŭ la individuoj. Tiu ĉi koloro ŝajne estas determinata de la animstato de ĉiu individuo. Siaflanke la "mensa ko po" forlasas la homan aspekton, ĝi prezentiĝas kiel ia luma bulo kaj ĝi okupas en la spaco la lokon kie devus esti la kapo de la astrala korpo.

Ĉu la ekzisto de tiuj diversaj homkorpoj pruvas la senmortecon de la elemento (aŭ pluraj) el tiuj, kiuj formas la vivantan kaj videblan homon? Persone mi ne taksis tion konvinka. Kiu tion scias? Eble tiuj "supermateriaj korpoj" ankaŭ spertas la diserigon kiel fizika corpo.

Iam mi renkontis konatulon, kiu estis tre fervora serĉanto sur la psika kampo. Li rakontis al mi sperton kun junulino, kiu okaze vizitis lin. Tiu psikisto estis tre serioza homo kaj mi ne havis ian kaŭzon por dubi pri lia sincereco. Tamen lia rakonto ŝajnis al mi tute ne verŝajna. Tiam mi esprimis al li mian skeptikon. Ni konsentis, ke mi ĉestos la proksiman eksperimenton, kiu denove okazos kune kun la junulino. Tiu ĉi junulino tute ne scipovis nian lingvon kaj ŝia denaskolingvo ne estis klara. Mia konatulo, kiun ni nomas s-ron D., estis kelkfoje vizitata de sinjorino, kiu estis poligloto kaj la junulino estis ŝia servistino. Kiam la junulino duafoje akompanis sian mastrinon por viziti s-ron D., li tuj informis min kaj mi urĝe iris al lia domo. Detale rakenti tiun renkontiĝon kaj la aferojn kiujn mi vidis kaj aŭdis ne estas eble. Mi tre kritike observis la eksperimentojn kaj senĉese miaj okuloj kaj miaj oreloj serĉis la mankon, la eraron, kiun povus eventuale fari aŭ la eksperimentanto aŭ la subjekto. Mi nenion trovis kaj la eksperimentado okazis korekte. Kio okazis tie?

S-ro D. dupartigis la junulinon kaj kiam la astrala korpo estis elirinta el la fizika korpo, la subjekto ekparolis pri drama evento, kiun nur sciis la sinjorino. La junulino -- aŭ pli gustdire la buŝo de la junulino - esprimis pensojn per klara lingvo kaj ŝajne la "parolanto tute ne estis la junulino". Post demando de s-ro D., tradukata de la mastrino,

la parolanto deklaris, ke li estis iu forpasinta parencino de la junulino. Post la adiaŭo de tiu ĉi parolanto du aliaj parolis, unu germanlingve kaj la alia franclingve. Tio, kion ili pritraktis, tute ne estis konata de unu aŭ alia ĉeestanto. Laŭ tio kion mi aŭdis, kiam la junulina buŝo parolis germanlingve, nia kunparolanto estis germana oficiro kaj, kiam la paroloj estis franclingve dirataj, nia kunparolanto estis teknika profesoro. Du observojn ni devas noti, ĉar ili estas tre gravaj. Ĉiufoje, kiam nia kunparolanto ŝanĝiĝis, la sintenado de la junulino ankaŭ tute ŝanĝiĝis. Ankaŭ la voĉo, la tono estis tute ŝanĝata. La transformiĝo de la junulino estis tiel kompleta, ke ni malfacile konsentis, ke la nuna junulino estis la sama ol tiu, kiu antaŭ kelkaj horoj eniris en la domon. Tio estis stranga, miriga kaj kvazaŭ nekomprenebla.

Ni dialogis kun la franclingva parolanto kaj mi notis kelkajn informojn, kiujn li donis al mi pri si, pri sia familio. Ĉiuj informoj tiel ricevitaj estis ĝustaj kaj mia enketo konfirmis ilin. Mia kunparolanto prezentiĝis kiel profesoro, protestanto kaj forpasinto, kiu pasinte loĝis en malproksima urbo, kiun neniu en la ĉeestantaro iam vizitis. Do, en tiu konversacio kaj en tiuj, kiuj poste sekvis la unuan mi estis konversacianta kun io, kio pasinte apartenis al iu profesoro kaj tiu "io" ankoraŭ vivis post la fizika morto de sia posedanto. Laŭ tio, kiel tiu ĉi "io" esprimis klare kaj precize kontroleblajn informojn, oni povis prudente supozi , ke tiu "io" kaj la "mi-o" de la iama profesoro estis la samaj.

Post kelkaj similaj renkontiĝoj foje mi ankaŭ vidis strangan fakton. Post la dupartigo de la junulino kaj kiam ŝia buŝo estis espriminta tion, kion volis diri niaj diversaj kunparolantoj, nova kun parolanto ekparolis kaj ŝajne liaj vortoj estis flamandlingva prediko, kiun la predikisto direktis al ia nevidebla ĉeestantaro. Plurfoje s-ro D. interrompis la predikon por prezenti kelkajn kontraŭdirojn per la sinjorino, kiu interpretis ilin kaj ankaŭ la rebatojn de la predikisto. Tiu debato longe daŭris pro la okaziĝinta tempoperdo pro la necesa traduko de la diroj kaj de la rebatoj de ambaŭ diskutantoj, kiam subite la predikisto senpacienciĝis. Tiam li turnis sin al sia kontraŭdiranto kaj neglektante la tradukantinon -- li rekte kaj franclingve respondis al li. Kaj jen la grava fakto, kiun mi rimarkis. La predikisto bonege diris franclingve siajn rebatojn. SED TION LI FARIS KUN LA PRONONCMANIERO DE LA FLAMANDOJ, kaj tio montris lian flamandan originon. Nu, kiam la buŝo de la junulino perante prononcis la vortojn de la franclingva profesoro, tion ŝi faris SEN NENIU FLAMANDA PRONONCMANIERO. Tamen tiu ĉi junulino estis flamando kaj logike, pro sia nescio de la franclingvo ŝi devis mallerte prononci la franclingvajn vortojn kaj frazojn. Nun ŝia prononcmaniero ESTIS PERFEKTA. Tiu ĉi fakto, tia rimarko ne permesis iun dubon: PER ILIAJ PRONONCMANIEROJ niaj kunparolantoj MALKOVRIS SENVOLE SIAJN NASKIĜORIGINOJN KAJ ANKAŬ SAJN KUTIME PRAKTIKATAJN LINGVOJN.

Vidante tion, tiam mi ne povis dubi, ke ni estis antaŭ "io", kiu devenis el iuj forpasintaj t.e. ia "io", kiu persiste ekzistas ankoraŭ post la forpaso de iu forpasinta homo. La fenomeno, kiun ni nomas morto, tute ne estis la finfina fino de ĉio, kiu konsistigas la homon. Antaŭ kaj post tiuj eksperimentoj de mi kritike observitaj mi

okaze ankoraŭ aŭdis aŭ vidis aliajn same strangajn faktojn, kiuj apogas la hipotezon de la postmorta vivo de unu aŭ pluraj "ioj", kiuj konsistigas la homojn.

Kompreneble mi povus silenti pri la sekvanta observo, kiu ne figuras en la observoj pri la homo sed mia veremo devigas min mencii akcesore ĝin. Kelkaj observoj de mi kaj de aliaj serĉantoj devigas min diri, ke la ĉi-supra hipotezo ankaŭ validas por la forpasintaj dombestoj kaj por bestoj, kiuj dum iliaj "videblaj vivoj" havis oftajn kontaktojn kun la homo.

*****

Mi ne volas fini tiun ĉi artikolon sen respondi al ia kontraŭargumento, kiu aperis en la kapo de kelkaj legantoj. Mi supozas ke iuj diras al si: "Kiel akordigi la ŝajnan persistemon de tiu ĉi "io" kion oni malkovris per la psikaj eksperimentoj kun la eldiro de la Budho, kiu instruas la nedaŭrecon de ĉiu komponaĵo?". Fundamente tiu ĉi kontraŭargumento verdire estas la sama kiel tiu, kiun oni jam prezentis kontraŭ la instruo de la renaskiĝoj homaj kaj la instruo de la disigo de ĉiuj komponaĵoj, ambaŭ instruitaj de la Budho. En tiu ĉi ŝajna kontraŭdiro intervenas la tempa faktoro. De forpaso de iu estulo ĝis lia proksima renaskiĝo okazas parte diserigo de tio, kio psike komponis tiun estulon. La disigo de la fizika parto de la estulo bezonas nur mallongan tempon, sed male la disigo psika kaj mensa de la estulo bezonas nekalkuleban tempon. Dum tiu ĉi nekalkulebla tempo okazas la multnombraj renaskiĝoj. Ankaŭ dum tiuj renaskiĝoj de estulo okazas tia diserigo psika kaj mensa, se li havas aktive spiritan vivon. La diseriga proceso estas malrapida kaj ĝi estas strikte ligata kune kun la spirita evoluo de ĉiu estulo.